

# Eŭropa Bulteno

---

Februaro 2009, № 1 (78)

---

*Karaj legantoj,*

*Proksimiĝas printempo kaj la periodo abundas je popolaj kutimoj. Ĉiuj havas proprajn kutimojn sed ili havas ion komunan: vintro forlasu la teron kaj venu printempo portante sunon, varmon, florojn kaj novan vivon.*

*Mi deziras al vi belan veteron, agrablan legadon kaj multajn novajn fortojn por nia agado.*

*Vesna Obradović*



El Slovenio: Saltante kaj kriante ili forpelas vintron kaj vokas printempon

## FORUMO DE BALTAJ LANDOJ

Dana Esperanto-Asocio partoprenis en la 8-a NGO Forumo de Baltaj landoj en Elsinore (Helsingør) Danio de la 26a de februaro ĝis la 1-a de marto. Jen mallonga raporto: Krom la oficialaj salutoj kaj prelegoj oni povis elekti unu el la 5 laborgrupoj: longdaŭra instruado, klimataj ŝanĝoj, socialaj aferoj, civitana dialogo, kultura diverseco kaj toleremo. Mi partoprenis la unuan grupon: longodaŭra instruado, ĉar mi volis informi min pri la financaj eblecoj de EU en tiu kampo.

**Ileana Schroeder**

## RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2008

La kotizpagado ĉi-jare okazis pli bone ol en la pasintaj jaroj. Mankis nur kelkaj pagoj.

La jaro estis escepte sukcesa el ĉiuj vidpunktoj. Finance ĝi estis la plej sukcesa jaro ĝis nun, ĉar ni finrealigis la projekton »Alieco kiel valoro« kies parton de la subvencio ni ricevis en 2008, sed ĉefe dank al gajno de aparta subvencio por nia laborprogramo kaj funkciado, kiun atribuis Eŭropa Komisiono (programo por eŭropa civitaneco). Temas pri aprobo de subvencio de 56.000 eŭroj kondiĉe ke ni mem kontribuas per propraj aliaj enspezoj de 14.000 eŭroj. Ni sukcesis ĉefe dank al multaj individuoj kaj asociaj kotizoj kolekti 14.000 kaj do kontentigis tiun postulon. Tio ebligis al ni havi de aprilo ĝis la jarfino profesian administranton de la asocia buroo (Maja Tišljar) kaj pagadon de la kostoj de la luita buroo en Bruselo (MAI, Rue de Washington 14). Pro tio ni sukcesis realigi ĉiujn planitajn erojn de nia laborprogramo prezentita kaj al nia asembleo kaj al EACEA (subvencianto).

- Prizorganto de la retpaĝaro Peter Baláž zorgis pri la paĝaro. Sed montriĝis ke niaj agadoj fariĝis tro ampleksaj kaj ke necesos jam en 2009 konstrui novan paĝaron, ĉar la nuna ne plu kontentigas la bezonojn.
- Redaktoro Vesna Obradović prizorgis regule ĉiumonate la elektronikan version de Eŭropa Bulteno, kiu legeblas ĉe nia retpaĝaro [www.eŭropo.eŭ](http://www.eŭropo.eŭ) kaj ĉe [www.gazetejo.org](http://www.gazetejo.org). Okaze de apero de ĉiu numero ni informis pri tio aron da internaciaj kaj naciaj retlistoj.
- Maja Tišljar redaktis apartan bultenon pri la okazadoj lige al EU-prezidado de Slovenio en unua duono de 2008. Aperis 6 numeroj de la bulteno kiun grupo da tradukistoj tradukis el Esperanto al 3-5 diversaj lingvoj kaj ni aperigis ĉiujn versiojn en nia paĝaro. Tiel ni montris ke ni helpas al EU tradukante oficialajn tekstojn al pluraj malpli grandaj lingvoj. Ĉefe kiel tradukistoj ni havis kunlaboron de helpantoj el Belgio, Pollando, Ĉeĥio, Germanio kaj Italio sub la gvido de Leo de Cooman.
- Ni finrealigas la taskojn kadre de la projekto »Alieco kiel valoro«, kiu estis planita daŭri ĝis la fino de marto eldoninte referaĵlibron de la konferenco »Interkultura dialogo kaj komunikado«, kiun aranĝis kaj redaktis Maja Tišljar. Kompreneble, ŝi devis ankaŭ ellabori kaj forsendi ampleksan raporton pri tiu projekto baze de kiu ni ricevis duan parton de la subvencio.
- Post la fino de la projekto ni sendis po unu ekzempleron de la referaĵlibro al 5 EU-komisionanoj al kies temoj la libro rilatas kaj al ministroj pri edukado en pluraj EU-landoj. Ni disdonis la libron ankaŭ al pluraj aliaj politikistoj, fakuloj kaj membroj de neregistaraj organizoj okaze de pluraj partoprenoj en la diversaj konferencoj kun nia ĉeesto.
- Ni distribuis helpe de Margareta Handzlik al EU-parlamentanoj (732 personoj) en junio leteron kun la invito partopreni en UEA-kongreso en Roterdamo (en la 23 eŭropaj lingvoj) kaj en septembro afiŝeton el Le Monde (kiun aperigis Etsuo Miyoshi).
- Ljudmila Novak, deputitino de Slovenio en EP helpis grave dum la tuta jaro en diversaj agadoj. Jam komence de la jaro (fine de januaro) kadre de ekspozicio pri slovenaj minoritatoj ŝi organizis ekspozicion pri Esperanto kadre de la ekspozicio pri interkultura dialogo inter gejunuloj en la ejoj de Eŭropa Parlamento en Bruselo. La ekspozicio estis efektivigita per 8 grandaj afiŝoj prezentante ĉiujn gravajn E-kampojn kaj per kelkdeko da reprezentanj libroj.

La malfermon partoprenis pluraj gravaj politikistoj (ĉefe slovenaj), sed ĝin vizitis ankaŭ pola membro de la eŭropa parlamento kaj unu el ĝiaj vicprezidantoj, sinjoro Bronislaw Geremek.

- Ljudmila Novak helpis ankaŭ organizi ekspozicion pri Esperanto en reprezentejo de Eŭropa Parlamento en Ljubljana, kiu daŭris unu monaton (malfermita je la Eŭropa lingvotago la 26-an de septembro kaj fermita la 25-an de novembro). Dum la malfermo parolis ankaŭ Ljudmila Novak kaj ricevis medalon kaj diplomon de Honora membro de EEU, kiun EEU por 2008 atribuis al ŝi kaj al Margareta Handzlik.
- Interparolante kun profesoro Geremek aperis novaj ideoj kaj realiĝis en julio en la Parlamento unua forumo pri Lingva problemo de EU invitita de profesoro Geremek kun partopreno de 25 personoj (5 MEPOj, deko da oficistoj en la parlamento kaj deko da organizantoj de EEU). Bedaŭrinde sinjoro Geremek mortis unu tagon antaŭ la kunveno en aŭtoakcidento.
- Ni ellaboris plian projektplanon por EEU por 2009 kiun ni transdonis al EACEA kaj kiu bedaŭrinde ne estis sukcesa.
- Ni organizis kunvenon de la asembleo de EEU dum la UEA-kongreso en Rotterdam kun du sesioj (unu fermita por la asembleanoj por 20 personoj - kaj unu malferma por ĉiuj interesitoj en kiu ĉeestis ĉirkaŭ 150 personoj el EU-landoj. La asembleo traktis la raportojn pri la agado en 2007 kaj la planojn por 2008 kaj 2009 kaj elektis la estraron por la sekva 3-jara periodo. Elektiĝis la sama 5-persona estraro kiel en la pasinta mandato: d-ro Seán Ó Riain kiel prezidanto, Flory Witdoeck kiel vicprezidantino kaj kasistino, Zlatko Tišljár kiel sekretario, Peter Baláž kaj Georgo Handzlik kiel membroj. Krome okazis 2 kunvenoj de la estraro, kunveno kun LKK de la sekva kongreso en Herzberg, kunveno kun Angela Tellier pri propedeŭtika strategio de EEU kaj aro da individuaj diskutoj pri eventualaj postaj EEU-kongresoj.



Grosseto

EEUorganizis du eŭropajn konferencojn:

1. En Grosseto (Italio) la 25-an kaj 26-an de aŭgusto kunlabore kun IEF pri »Estonteco de la ideo de Eŭropa identeco« kun partopreno de 40 personoj el deko da landoj kaj 5 prelegoj (O Riain, Z. Tišljár, R. Clerici, R. Corsetti). Ĝin oficiale ĉeestis Seán Ó Riain, Zlatko Tišljár kaj Maja Tišljár

2. Ni organizis ankaŭ konferencojn pri »Dukaj plurlingva edukado« en Bruselo la 10-an de

decembro en Bruselo. Partoprenis kvindeko da partoprenantoj el 15 landoj kaj okazis 12 prelegoj kiujn efektivigis 10 prelegantoj. Inter ili estis tri estraranoj de EEU: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljár kaj Flory Witdoeck. La konferencojn salutis du membrinoj de la EU-parlamento: Malgorzata Handzlik kaj Ljudmila Novak kaj reprezentanto de Eŭropa komisiono, sinjoro Konrad Fuhrmann. Detalojn pri la konferencoj eblas vidi en tiurilataj artikoloj en la Eŭropa Bulteno.

- Jam la 3-an fojon EEU estis partnero de Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando), kie kolektiĝis 1500 elituloj de Eŭropo (ĉefe orienta), ekonomikistoj, politikistoj, diplomatoj, bankistoj, korporacigvidantoj. Ni havis aparte bone organizitan kaj prizorgitan standon (preparis Petro Balaž kaj deĵoris tri volontuloj de Pola E-junularo). Prezentiĝis afiŝoj,

- faldfolioj en pluraj lingvoj, kalendaretoj, libroekspozicio ktp. La forumo estis okazo paroli kun pluraj gravaj personoj inter kiuj Lech Walesa (eksa pola prezidanto) kaj Dušan Čaplovič (vicprezidanto de slovaka registaro). Kiel partnero EEUorganizo apartan foruman sesion pri »Unuiĝintaj en diverseco? Lingvolernado kaj eŭropa identeco« en kiu prelegis pollingve kaj anglalingve Barbara Pietrzak, Zlatko Tišljar, Georgo Handzlik kaj Peter Baláž. La aranĝo okazis de la 10-a ĝis la 13-a de septembro kaj kunfinancis ĝin ankaŭ ESF kaj UEA.
- La skipo gvidata de Andrej Naterer kiel reĝisoro kaj Neža Bojnc, Zlatko kaj Krunoslav Tišljar, finfaris la 12-minutan filmon »Eŭropo 2050«, kiu sur DVD disko estas ricevebla de ĉiu petanto.
  - Okaze de Tago de gepatraj lingvoj de UNO EEU invitis landajn asociojn signi ĝin laŭ la eblo, kion pluraj el ili faris. En Maribor okazis en la ejoj de Popoluniversitato (AZM-LU) 7-taga ekspozicio pri Esperanto: 8 afishoj de Danko Tišljar kaj libroekspozicio. Okazis la sama ekspozicio en la franca urbo Nazaire en la ejoj de la urbestrejo. Pluraj aliaj landaj asocioj distribuis afiŝon pri tiu tago en siaj naciaj lingvoj, kiun ellaboris UEA por tiu okazo.
  - Okaze de eŭropa lingva tago la 26-an de septembro la estraro invitis landajn asociojn festi ĝin per prelegoj kaj publikaj aranĝoj atentigante pri la UNO-jaro de la lingvoj kaj mondvasta danĝero pri malapero de pluraj malgrandaj lingvoj. En Ljubljana ni organizis ekspozicion pri Esperanto en la ejoj de Eŭropa Parlamento por Slovenio okaze de kies malfermo la 26-an de septembro solenajn parolojn faris Zlatko Tišljar kaj Ljudmila Novak (MEP). EEU disdonis la 24-an de septembro al ĉiuj membroj de la Eŭropa Parlamento afiŝon aperigitan en Le Monde (kiun financis Etsuo Miyoshi) sur kiu estis centraloke la foto de Bronislaw Geremek kaj per tio ni atentigis pri la UNO-jaro de lingvoj.
  - Pluraj landaj asocioj ankaŭ prinotis la Eŭropan lingvan tagon per ekspozicioj, prelegoj kaj informoj en siaj retpaĝoj.
  - En Strasburgo la turistaj ŝipoj enkondukis apud aliaj lingvoj ankaŭ Esperanton por klarigoj dum vizito de la urbo ankoraŭ en 2007, sed solenan inaŭguron de tiu novaĵo la urbo okazigis en junio 2008 kiam en la inaŭguro partoprenis ankaŭ Margareta Handzlik, francaj esperantistoj (sinjoro Tschudy) kaj franca MEP-ino Catherine Trautmann.
  - Multaj publikaj informrimedoj informadis pri ĉiuj tiuj aranĝoj.
  - Niaj reprezentantoj partoprenis en multaj eŭropaj aranĝoj ligitaj al lingvaj demandoj. Ni mencias nur la plej gravajn:
  - Zlatko kaj Maja Tišljar partoprenis en inaŭguro de la Jaro de Inter-kultura Dialogo kaj tiutema eŭropa simpozio en Ljubljana (Slovenio) la 6-an kaj 7-an de januaro.
  - Seán, Flory, Maja kaj Jozef Reinart partoprenis en malfermo de priesperanta ekspozicio (kadre de tiu pri interkultura dialogo inter gejunuloj) en Brusela EP kiam prelegetis ankaŭ nia prezidanto la 30-an de januaro.
  - Seán kaj Jozef Reivart ĉeestis en Ministra Konferenco pri multlingvismo organizita de Eŭropa Komisiono en Bruselo la 15-an de februaro, kiam estis prezentita la Maalouf-raporto.
  - Zlatko ĉeestis en konferenco de neregistaraj organizoj organizita de slovena registaro pri slovena gvidado de EU la 12-an de februaro en Ljubljana.
  - Ĉiuj estraranoj partoprenis en kunsido de la estraro en Bruselo la 8-an de marto kaj la 9-an okazis kunveno inter la estraro kaj reprezentantoj de Brusela E-klubo.
  - En Publika diskuto pri multlingvismo la 15-an de aprilo en Bruselo ĉeestis Maja, Seán kaj Jozef. En la raporto pri tuteŭropa enketo pri estonteco de EU oni menciis ke unu el la oftaj

proponoj pri solvo de lingva problemo menciita kune kun la nocio »lingua franca« kiel solvo estis Esperanto.

- En la Kongreso de esperantistaj ĵurnalistoj partoprenis Seán, Petro kaj Georgo aprile.



- La 7-an de majo okazis debato organizita de Cafebabel en Bruselo kun ĉeesto de komisionano pri lingvoj Orban. Diskutis kelkaj esperantistoj. Partoprenis Seán, Maja, Remy, Flory, Michael Cwik k.a.

- La 23-an de junio Zlatko partoprenis en la dua kunveno de neregistaraj organizoj en Ljubljana kaj raportis pri la agado de EEU kaj eldonado de bulteno pri slovena prezidado kaj ties retradukado al pluraj lingvoj.

- Dum julio kaj aŭgusto okazis eŭropa enketo inter instruistaro pri modernigo de la lernejaj sistemoj. Respondis interalie 6 personoj kiuj pledis por Esperanto (necesas konsideri ke en kelkaj landoj neniu instruisto respondis kaj en kelkaj malpli ol 5 personoj).
- Zlatko partoprenis en studenta internacia konferenco en Maribor (Slovenio) kie li prelegis pri »Sub kiuj kondiĉoj interkultura dialogo estas ebla« la 25-an de junio.
- La 14-an de julio Seán, Maja, Jozef, Ljudmila, Margareta kaj Flory partoprenis en forumo kiun kunvokis sinjoro Bronislaw Geremek en ejoj de Eŭropa Parlamento en Bruselo kun la debattemo »Esperanto: ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo«. Prelegis Seán, Ljudmila, Margareta kaj germana deputito Michael Gahler.
- Zlatko havis tri prelegojn pri minoritataj temoj dum la IJK en Szombathely (Hungario) en julio.
- Seán kaj Zlatko prelegis dum la Esperantologia konferenco en Rotterdam dum UK en julio. Zlatko prelegis pri Eŭropaj valoroj dum la junulara E-aranĝo MIRO en Duga Resa (Kroatio) en aŭgusto.
- Inter la 28-a kaj 30-a de aŭgusto Seán partoprenis (kaj prelegis) en kunveno de Eŭropa Verda Somera Universitato en Frankfurto sur Odro (DE) pri lingva politiko.
- Inter la 17-a kaj la 21-a de septembro Seán partoprenis la Eŭropan Socian Forumon en Malmö kaj prelegis pri »Egalrajta tutmonda interkultura dialogo«.
- De la 18-a ĝis la 25-a de septembro Vesna Obradović partoprenis en »Semajno de kulturo internacia« en Toskanio kie temis pri prezento de diversaj eŭropaj kulturoj en elementaj lernejoj.
- La 23-an de septembro Seán partoprenis en Bruselo en kunveno de poliglotoj kaj havis plurajn intervjuojn en kiuj li parolis pri Esperanto.
- Zlatko partoprenis en publika forumo okaze de Eŭropa lingva tago en Triesto (Italio) kaj prelegis pri Eŭropa Identeco en septembro.
- La 3-an de oktobro Seán kaj Maja partoprenis la Laborgrupon »Aktiva Eŭropa Civitaneco« de la Eŭropa komisiono, kie Seán plurfoje kontribuis al la diskutoj menciante aktivadon de EEU.
- La 14-an kaj 15-an de oktobro Maja partoprenis en konferenco pri alfabetigo LitCam en Frankfurt am Main.

- Inter la 9-a kaj 12-a de oktobro Zlatko partoprenis en Torpedo (instruista seminario) en Herzberg (Germanio) kaj prezentis la Zagreban instrumetodon. Li uzis la okazon diskuti kun LKK de la sekva EEU-kongreso.
- La 18-an de oktobro Seán partoprenis en la konferenco en la universitato de Galway en Irlando kaj prelegis pri »Esperanto por plibonigi la lernadon de la irlandano«.
- La 6-an kaj 7-an de novembro Seán kaj Jozef partoprenis en konferenco »English only?« organizita de Goethe Institut.



Dublin

- La 8-an de novembro Seán prelegis en Dublina universitato pri Esperanto kaj propedeŭtiko.
- La 11-an de novembro Seán kaj Jozef partoprenis kaj diskutis en konferenco »Lingva kaj kultura diverseco en EU« organizita de Asocio por diskonigi la italan lingvon »Assodilit« en Bruselo.
- La 13-an kaj 14-an de novembro Maja partoprenis la jaran forumon de la programo »Eŭropo por civitanoj« de la Eŭropa komisiono.
- La 20-an de novembro Seán partoprenis en Radio intervjuo kun Interpreta Servo.
- Zlatko partoprenis en Simpozio pri Kroata identeco kaj esperanto en Zagrebo okaze de 100-jariĝo de KEL kaj prelegis pri Eŭropaj valoroj la 7-an de novembro.
- La 15-an de decembro Seán kaj Jozef partoprenis en Parizo en solenaĵo de UNESCO pri Zamenhofa Jaro 2009.
- La 23-an de oktobro Petro Baláž kaj Jozef partoprenis en diskutforumo pri multlingveco en Bratislavo organizita de Eŭropa Komsiiiono.
- La slovena tagĵurnalo Večer aperigis grandan artikolon kun bildo de Zlatko Tišljar informante en aŭgusto ke li iĝis denove sekretario de EEU, Radio Val 202 faris intervjuon kun Ljudmila Novak kaj Zlatko Tišljar okaze de Eŭropa Lingva Tago. Intervjuon kun Zlatko Tišljar faris ankaŭ televido Pika el Ljubljana. Centra slovena televido Slo1 informis la observantojn dum tre populara kviz-elsendo »Piramida« en kiu partoprenis ankaŭ Ljudmila Novak, ke ŝi estas esperantistino.
- Okaze de la konferenco en Bruselo pri Du- kaj plurlingva edukado aperis informo en senpaga ĉiutaga belga revuo »Metro« (kiun legas granda plimulto de oficistoj kaj politikistoj en Bruselo). Aperis ankaŭ multaj aliaj artikoloj en diversaj medioj.
- Ankaŭ pluraj E-revuoj raportis pri atingoj de EEU, speciale pri la akiro de grava eŭropa subvencio (La Voĉo de EDE, Libera folio, Esperanto-revuo kaj preskaŭ ĉiuj revuoj de landaj asocioj).
- La artikoloj kaj intervjuoj kun Seán Ó Riain aperis plurfoje en diversaj gazetoj kaj radioj. Okaze de la konferenco en Grosseto la prezidanton intervjuis 2 lokaj televidstacioj. Aparte menciindas liaj du artikoloj en la oficiala bulteno de tradukista servo de Eŭropa Komisiono kaj en la ĉefa irlandalingva gazeto.

## Maja kaj Zlatko Tišljar

## VOĈDONO POR LA AMENDOJ DE LJUDMILA NOVAK EN LA EŬROPA PARLAMENTO

La 17-an de februaro je la tagordo de la Kultura Komisiono de Eŭropa Parlamento okazis interalie voĉdono pri la 3 amendoj de Ljudmila Novak rilate la proponon de prilingva dokumento, pri kio ni skribis en la januara numero. Ljudmila Novak aperigis ĉe sia blogo la eblon subteni tiun ŝian proponon kaj eblis voĉdoni por aŭ kontraŭ la amendoj. Dum nur 4 semajnoj estis pli ol 5000 voĉoj kaj 99% subtenis la amendojn. Estis ankaŭ 150 interesaj komentoj.



La slovena ĵurnalo Delo aperigis la 18-an de februaro artikolon en kiu ĝi nur diras ke la amendoj de Ljudmila Novak pri Esperanto estis malakceptitaj, simile skribis hispana ĵurnalo, eble kelkaj aliaj, sed neniu efektive aperigis la konkretajn rezultojn de la voĉdono. Ljudmila Novak mem ne reagis ankaŭ al mia peto priskribi la kunvenon, sed en la kunveno ĉeestis ankaŭ nia EEU-prezidanto Sean O Riain, kiu mallonge priskribis la eventon jene:

»Fakte mi miris pri la tuto. Ili ege rapide voĉdonis, nur per levo de manoj. Dum 1 horo ili voĉdonis pri 6 dokumentoj, kaj ĉiu dokumento havis 30-40 amendojn. Estis tiom rapide ke oni eĉ ne povis nombri. Nur unu fojon dum la tuta horo ili kalkulis precize - estis io pri la budĝeto, kaj la voĉdonado estis 14 por kaj 14 kontraŭ, do "malakceptita", ili diris.«

La kunveno sekve funkciis strange. La prezidantino de la Komitato tute ne permesis debaton. Okazis nur voĉdonadoj per levado de manoj. Oni do efektive ne scias ĉu la plimulto de la komitatanoj estis por aŭ kontraŭ la amendoj.

La tuta afero estas tre suspektinda, sed ĝi montras ke efektive ekzistas klaraj direktivoj agi kontraŭ ĉiu serioza klopodo en kiu Esperanto ricevus iun ŝancon. Ne sciante efektive ĉu Esperanto reale povus havi subtenon, tiuj kiuj havas potencon (mi supozas iuj fortoj en eŭropaj organoj kiuj batalas por la venko de la angla) instrukciis la prezidantinnon tiel agi.

**Zlatko Tišljar**



## **KIEL UZI LA BONVOLON DE IU POTENCULO KAJ GRAVECO DE PROFESIA APARATO**

Interesa novaĵo venis el Brazilo. Senatano de Brazila senato Cristovam Buarque prezentis leĝon kiun la senato akceptis favore al Esperanto. Ĝi nun iros al supera ĉambro de la parlamento kaj poste al la ŝtatprezidanto. Oni supozas ke ne estos problemoj sur tiu vojo. La leĝo por mezlernejoj metas Esperanton en la unuan pozicion de lerneblaj fremdaj lingvoj, kvankma ankaŭ ĝis nun eblis lerni ĝin en brazilaj lernejoj, ĉar pri fremdlingvoj decidis lernejoj komunumoj mem kaj Esperanto estis tiusence elektebla ankaŭ antaŭe. Tiu fakto kaj la klopodo de eŭropa parlamentanino Novak pensigis min pri tio, kiel efektive eluzi la vojojn kiujn malfermas al ni fojfoje iu kuraĝa politikisto.

En komenco de la okdekaj jaroj esperantistoj en Zagrebo havis aliron al la vicprezidanto de la tiama kroata parlamento Nikola Šegota kaj kiam ni en Internacia Kultura Servo petis lin fari ion por Esperanto, li diris: "Mi volonte helpos vin (li simpatiis al Esperanto), sed vi devas diri al mi kion mi faru, vi devas havi realisman vizion, kiun mi klopodos realigi je politika nivelo, sed vi devas kapabli sekvi en praktiko tion kion mi politike faros." Feliĉe ni havis ideon kaj ni havis aparaton (profesian entreprenon kun deko da oficistoj: Internacia Kultura Servo). Nia vizio estis ebligi ke Kroata Loterio enmetu inter la ricevantoj de la profito ankaŭ E-organizon. Šegota unue igis ke la parlamento nomumis lin prezidanto de la kontrolkomitato de la Loterio. Tiam li entreprenis procezon de ŝanĝo de la leĝo en kiu ĝis tiam la profiton ricevadis nur humanismaj kaj sportaj organizoj. Lia celo estis aldoni al ili ankaŭ "socie gravajn porjunularajn organizojn". Paralele li agis en tiama popola fronto por krei regularon kun kriterioj laŭ kiu La popola fronto proklamos, kiu estas "socie grava porjunulara organizo" kaj ni devis liveri al li pruvojn ke agado de Kroata E-Ligo estas tia. Do li sukcesis ŝanĝi tiusence la leĝon pri Loterio kaj aranĝi ke la popola fronto decidis pri deko da organizoj kiuj ĉefe zorgas pri junularo inter kiuj estis ankaŭ Kroata Esperanto-Ligo. Post tri-jara agado ni havis la leĝon kaj la leĝan kadron en kiu enestis la E-organizo kiel legala uzanto de la profito de kroata Loterio. Ekde 1984 ĝis 1990 KEL ricevis grandegajn sumojn de la Loterio kaj tiam estis enormaj rezultoj de la E-movado. Bedaŭrinde en 1991 ekregis alia sistemo en kiu ne plu gravis "socie gravaj" aferoj sed persona profito kaj la novaj potenculoj tuj forigis tiun eblecon ke esperantistoj ricevadu monon de la Loterio.

Sed la ekzemplo montras, ke la tuto en kiu la ĉefan rolon havis potenca homo, ne funkcius se liajn klopodojn ne priservus daŭre profesia teamo kiu reagis je ĉiu lia iniciato kaj praktike plenumis aferojn kiujn amatoroj ne povas (ekz. por havi subtenon en la popola fronto, li devis havi publikan konstantan subtenon. Pro tio li iniciatis ke en du gazetoj (ĉefa tagĵurnalo Večernji list kaj sindikata semajnevuo Radničke novine ni ricevu daŭran rubrikon pri Esperanto. Necesis ĉiusemajne aperigi artikolojn en Večernji list kaj aranĝi la tutan paĝon en Radničke novine. Tion ne povis fari amatoroj. Por havi subtenon enkondukante E-organizon inter la gravaj junularaj organizoj, li devis pruvi ke KEL havas milojn da junaj membroj. Efektive Internacia Kultura Servo gvidis tiam kursojn en 15 elementaj lernejoj, en la jaroj antaŭ la 100-jarigo de Esperanto ni organizis ĉiumonate novan ekspresan kurson kaj jare ni vere havis en tuta Kroatio 2-3000 lernantojn. Sen profesia aparato kiu subtenas tian politikan klopodon, ne estas ebla la enpraktikigo de la politikaj decidoj. Esperantistoj kutime vivas en iluzio, ke sufiĉas ke iu saĝa politikisto enkonduku leĝon kaj ĉion alian faros la ŝtato sen ni. Tio ne estas vero. Ni devas plenumi realajn laborojn kiujn postulas la leĝo, tion ne faros aliaj.

**Zlatko Tišljar**



## KONGRESOJ EN HERZBERG

En marto finiĝos la sekva, ankoraŭ favorpreza aliĝperiodo! Ankoraŭ estas ŝanco rezervi lokon je malalta kotizo se vi tuj aliĝos.

Bonvolu rigardi la aliĝilon sur la kongresa hejmpaĝo: <http://gek-EEK.esperanto-urbo.de>

Grava novaĵo: La duobla kongreso en Herzberg am Harz havos ankaŭ unutagan konferencon sub la temo: Signifo de la falo de Berlina muro por interhomaj kontaktoj inter Orienta kaj Okcidenta Eŭropo. LKK sukcesis atingi, ke la kongreso kun tiu Eŭropa konferenco okaze de la dudek-jara jubileo de la falo de la Berlina muro apartenas al la oficialaj aranĝoj de la federacia registaro en Germanio.

Pro tio nia aranĝo aperos en multaj informkalendaroj, retnovaĵoj, ktp, de kie ĉerpas informon ankaŭ la gazetaro kaj amasmedioj.

La ministroprezidento de Malsupra Saksio, Christian Wulff en la funkcio kiel alta protektanto, verkis tre bone formulitan salutmesaĝon kaj sendis al LKK por enmeto en la kongreslibron.

La Koruso de la Hungara Parlamento, Szena-torok jam kompilis sian festprogramon. Ili prezentos varian repertuaron ankaŭ kun surprizo por la Esperantista publiko.

Al la bunta dumkongresa muzika programo aldoniĝos kantoj de Georgo Handzlik kaj la ensemblo Querbeet, kiu ludas klerzmer-muzikon.

Nova menupunkto aperis sur la kongresa hejmpaĝo: aparta junulara programo dum GEK/EEK estas en preparado! Jen kelkaj specialaj ofertoj de GEJ kaj LKK por la junularo:

- \* malalta aliĝkotizo
- \* amasloĝejo tuj apud la kongresejo (en la gimnazia sporthalo)
- \* aparta junulardomo apud la kongresejo en bela parko
- \* diversgrandaj ĉambroj por kunsidoj, kunvenoj
- \* bone ekipita domo por amuzado, agrabla atmosfero
- \* kuireja angulo por memzorgado
- \* ebleco uzi komputilojn, interreton
- \* granda salono por diskoteko, kun ekipaĵo
- \* ekskursoj en la regiono



Programeroj:

- \* multaj muzikaj kaj dancprogramoj
- \* diskoteko
- \* projekciado, prezentadoj
- \* lingvoekzercado en internacia medio
- \* kantado
- \* partopreno en la urba festo, procesio
- \* karuseloj, budoj, festaj ludoj

Junaj, malpli junaj partoprenontoj: lasu vin esti surprizitaj. allogataj! Eluzu la favoran aliĝperiodon ĝis la 31-a de marto!

**Petro Zilvar kaj Korody Zsofia**

## BLOGO PRI KOMPUTILA MONDO EN ESPERANTO

Celo de la nova projekto de la organizo E@I estas liveri interesajn novaĵojn pri la komputilaj aferoj en Esperanto en la formo de blogo en interreto. Eblas informiĝi pri diversaj aferoj, rilataj al komputiloj kaj modernaj teknologioj ĝenerale (interreto, programaro, grafikaĵoj, ...). Nur se lingvo estas vere uzata en ĉiuj eblaj vivosferoj ĝi povas montri sian efikecon kaj taŭgecon. Unu kroma celo de la retejo estas ĝuste iom eduki publikon ankaŭ pri ĝustaj prikomputilaj terminoj (ofte malĝuste uzataj far ĝenerala esperantistaro). Kaj krome – estas certe utile kunigi homojn kun samaj aŭ similaj interesoj ĉirkaŭ iu specifa projekto aŭ celo – do por komputilemaj kaj ĝenerale scivolemaj homoj pri modernaj tenkologioj ekestis bona „nesto“ por kunlaboro.




Cefpaĝo Pri la blogo Teamo

Lundo, la 23-a de februaro 2009

### Ĉu Windows 7 aŭ KDE 4?

PUBLIKIGITA FEBRUARO 15, 2009 DE KUBDE

Chris Duckett kaj Alex Serpo de la retpaĝaro ZDNet Australio faris etan eksperimenton. Ili iris tra la stratoj de Sydney kun portebila komputilo kaj montradis al homoj novan version de KDE 4. Sed ili diris ke ĝi estas nova testa versio de Windows 7. Tiu ĉi esplorado montris ke homoj malŝatas na Windows Vista, kaj ke la montrita sistemo aspektas pli bele kaj simple. Interesaj estas ankaŭ respondoj al demando ĉu homoj ŝanĝos sian nuntempan Vindozon kaj ekuzos la montritan "Vindozon": "Certe, ĝi aspektas simile al Apple." aŭ "Jes, ĝi aspektas pli simple." Legi plu...



KATEGORIO: AMUZAĴOJ KAJ INTERESAĴOJ | ETIKEDOJ: COMPIC, KDE, LINUX, WINDOWS | 1 KOMENTO

### Vendrede la 13-an UNIX-a tempo atingos la limon 1234567890

PUBLIKIGITA FEBRUARO 10, 2009 DE KUBDE

La 13-an de Februaro 2009 je 23:31:30 GMT, do post malpli ol unu semajno, UNIX-a tempo atingos la limon 1234567890. UNIX-a tempo estas tempo en sekundoj de 1.1.1970 0:00 UTC (Coordinated Universal Time - Universala Tempo Kunordigita) sen supersekundoj. Vi ankaŭ povas vidi la retpaĝon [coolpachcountdown.com](http://coolpachcountdown.com) por vidi precizan UNIX-an tempon.

Se ĉio pretos bone eble Debian GNU/Linux Lenny havos belegan tempon de naskiĝo.



KATEGORIO: AMUZAĴOJ KAJ INTERESAĴOJ | ETIKEDOJ: TEMPO, UNIX | NENIU KOMENTOJ

### Skajpo lanĉis version 4.0

La paĝar-adreso estas: <http://blogu.ikso.net>

PS: E@I-teamo bonvenigas komputilemajn verkemajn kunlaborantojn, kun bona lingvo-kono por kontribui al la paĝaro per interesa enhavo. Kaze de interesiĝo skribu al [peter.balaz@ikso.net](mailto:peter.balaz@ikso.net) aŭ al [jevgenij.gaus@ikso.net](mailto:jevgenij.gaus@ikso.net)

Rim.: [www.ikso.net](http://www.ikso.net) estas oficiala retejo de E@I

**Peter Baláž**

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 3-an de marto 2008.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Ileana Schroeder, Maja Tišljar, Zlatko Tišljar, Petro Zilvar kaj Korody Zsofia, Peter Baláž kaj Vesna Obradović

Kontakto: [vesna.obradovic@gmail.com](mailto:vesna.obradovic@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, [www.europeo.eu](http://www.europeo.eu)

Kun-financata de Eŭropa Unio kadre de la programo "Eŭropo por Civitanoj"2007 – 2013.

